



La Kolombo de Paco

21-a de aŭgusto 2021, numero 19

Redaktas Dmitrij Ŝevčenko kaj Anna Striganova



Teatreca prezento de "Dialogo" de Julia Sigmond

Ana Manero kaj Manolo Parra prezentas dialoge la poemon "Dialogo" de Julia Sigmond.

Ĉi filmeto estas parto de la Ceremonio de Disdono de Premioj de la Belartaj Konkursoj en 2020.

Vi povas spekti ĝin ĉe jutubo:

<https://youtu.be/tffNQU6SoLw>.



La Verda Stelulo spektebla ĉe jutubo



La Verda Stelulo (1996) estas sciencfikcia filmo. Reĝisoris Francisko Randin. Dialogoj de Johán Valano. Kun Rolfo, Georges Lagrange, Lucienne Dovat. Scenaro de Dan Nir. Laŭ la enhavo en la filmo eksterteranoj lernas Esperanton por komuniki kun homoj. Daŭro estas 30 min. Ĝi estis triloke premiita en la Belartaj Konkursoj de UEA en 1996 kaj, okaze de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto, donacita al *UEA viva* de Esperanto Lausanne (Laŭzana Esperanto-Societo), al kiu ni multe dankas. Originale estas la formato PAL, NTSC.

La filmo estas spektebla ĉe:

<https://youtu.be/8cld67nYY3U>.



88-a Itala Kongreso de Esperanto

La 88-a Itala Kongreso de Esperanto okazas nun en Asizo. Ĝi daŭras inter la 20-a kaj 27-a de aŭgusto 2021. Temo de la aranĝo estas: *Sankta Francisko kaj la prediko al la birdoj: komunikado inter malsamuloj kiel vojo al paco*. Ĉefa reprezentanto de UEA dum la kongreso estas prof. Duncan Charters, la Prezidanto de UEA, kiu prelegas dum la Solena Inaŭguro kaj gvidos la seminarion "Komunikado: interpersona, informa, transkultura, konfliktsolva. Interpersona komunikado: kiel tion faciligi kaj eviti konfliktojn".

Detalajn informojn eblas ricevi ĉe <https://kongreso.esperanto.it/88/> kaj ankaŭ en la fejsbuka paĝo <https://www.facebook.com/esperantoitalia/>, kie i.a. estas antaŭvidataj ankaŭ la vivelsendoj.



88-A ITALA KONGRESO DE ESPERANTO





Ankoraŭ pri iom da AMO dum la Virtuala Kongreso de ILEI

En La Kolombo de Paco, numero 18, ni publikigis la unuan parton da informoj pri la prelegoj de AMO 76, kiu aperis en EKO 33. Nun aperas la dua parto.

■ Stefan MacGill

Tio okazis en merkredo, la 11-a de aŭgusto, kadre de la Kongreso de ILEI (VEKI 2). Jen la liverita programo:


Hori Jasuo: ‘Esperanto-Sumoo’. Tiu projekto strebas konvinki homojn legi pli da Esperanto-libroj. Partoprenantoj deklaras, kiom da paĝoj ili legu ĉiutage. Tial la sumoo-gajnantoj dependas je diligenteco kaj ne pezo. La sumaj atingoj de la programo troveblas en Vikipedio.

Bak Giwan: prezentis la Esperanto-Muzeon en Zaozhuang-Universitato, Ĉinio, per fotoj kaj tri-dimensiaj videoj. La muzeo establiĝis en 2013 kunlabore inter ĈEL, UEA, ILEI kaj Zaozhuang-Universitato. Tie troviĝas Esperanto-Fako, kie nun studas 48 gestudentoj. La muzeo bezonas kunlaboron de ĉiuj esperantistoj en la mondo. Bonvole vizitu jenajn retejojn por ĝui videojn de la muzeo.

<http://www.e-muzeo.com>

<https://mallonge.net/80>

<https://mallonge.net/gx>



Martina Kvarantan Ŝmitran: ‘Per scivolemo al kapableco’. Ŝi atentigis, ke la homo ekde sia frua infanaĝo montras la inklinton al scivolo. Scivola infano dum la vivo estos pli sukcesa. Tamen, la eniro en la institucian edukadon (lernejo) kun ĝiaj reguloj iel deziras silentigi la scivolon. La sciemo aŭ scivolemo estas tre kreiva stato, kiu instigas nin fari demandojn en la es-tanta situacio. Demandoj donas al ni informojn (rime-

dojn), kiujn ni ĝis tiam ne havis aŭ ne rimarkis, kaj tio helpas al ni decidi ĝuste reagi en la koncerna situacio.

Pawel Fischer-Kotowski: ‘Pri Esperanto bibliotekoj’. Li kiel profesia bibliotekisto povis tre kapable skizi la obstaklojn kaj bezonojn de bone funkcia kaj alirebla biblioteko. Longdaŭra celo estas la pli efika perreta kunordigo de la katalogoj de pliaj bibliotekoj.

Aleks André: ‘Enkonduko de Esperanto en la lernejoj’ ĉefe en Francio. Tiu prezentaĵo gamis de klasĉambraj spertoj ĝis rilatado kun edukinstancaj gravuloj, por gajni kaj teni la rajtojn je instruado de Esperanto kaj aliri al ŝtataj ekzamenaj sistemoj, ekz. la bakelaŭro.

Enrico Borello kaj Alessandro Simonini: ‘Biblioteko de Massa kun atento al ĝiaj rilatoj kun ILEI’ Tiu rilatoj klare centriĝas laŭ la personecoj de Mario kaj Catina Dazzini. Mario estis prezidanto de la Ligo, kaj Catina multjare ĝia sekretario. Ambaŭ estas honoraj membroj de la Ligo. La kolekto pliriĉiĝis en 2020, po donacoj de Filippo Franceschi, plumnomo Sen Rodin, kaj de lia edzino, Julia Sigmond. Plie alvenis ĉirkaŭ mil libroj de la fermita Biblioteko “Glauco Corradi” en Milano al la ŝtate protektata muzeo en Massa.

Jen retejo, kiu resumas la Esperanto-bibliotekojn tra Eŭropo, de kiu ni en nia PDF ĉerpis la interaktivan mapon. Vere, ĉi tiu retejo estas postsekvanto de la Jarlibra sekcio pri bibliotekoj, almenaŭ por Eŭropo. Restas la tasko kovri la tutan mondon.

<https://bibliotekoj.org/esperantajbitojesperantistajbibliotekoj.html>



Mireille Grosjean: ‘Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lernejo en la mondo’ Tiu projekto liveras al multaj lernejoj en Francio kaj aliaj landoj pretajn paketojn da materialoj kaj rimedoj por ebligi al ajna instruisto prezenti unu lecionon pri la lingvo. La materialo dividiĝas al tri partojn. Unue, tre baza prezento de la lingvo, due ĝia kultura fono kaj trie, temo kiu nomiĝas ‘krozo inter la lingvoj’.

Marija Belošević: ‘Kontribuo al Esperantoo-kulturo: traduke kaj sursceneje’. Ŝi atentigis pri la ricevintoj de la diplomoj pri Elstara Agado kaj Ekstera Arta Agado, inter kiuj troviĝas pluraj kiuj kontribuas al la Esperanto-kulturo de “nia epoko”. Pro tio, la listo povus esti bona deipunkto por Esperanto-kulturo. Ŝi re-



liefigis la rolojn de tri elstaraj esperantistoj kiuj dum jardekoj donis grandegan kontribuon al Esperanto-kulturo: la profesia aktorino Vida Jerman (1939–2011), Antonio De Salvo (1942–2021), kreinto de la informriĉa blogo “Esperanto vivo” (<https://www.bitoteko.it/esperanto-vivo/eo>), kaj la kroata tradukistino kaj verkistino Lucija Borčić (1921–2015).

Sekvis diskuto kaj demandoj antaŭ la fermo de la seminario.

El EKO-34



Reta edukado nun: Erasmus subtenas

■ Francesco Maurelli

Okazis en Đurđevac, Kroatio, EU, la unua ĉeestanta kunsido de la projekto Erasmus+ “Reta Edukado Nun”, fokusita pri la defioj pri edukado en la reta medio – aparte, sed ne nur lige al la pandemiaj defioj. La renkontiĝo traktis ankaŭ arkivadon kaj eldonadon, kaj kontribuis pluraj fakuloj en la Esperanto-movado.

La programo estis ĝuebla rete por ĉiuj interesitoj.



2021/08/13 – sesio 1

(<https://eventaservo.org/e/ren1>)

✂ Ana Manero: Biblioteko Juan Régulo Pérez de Hispana Esperanto-Federacio

✂ Josip Pleadin: Dokumenta Esperanto-Centro en Đurđevac

2021/08/14 – sesio 2

(<https://eventaservo.org/e/ren2>)

✂ Josip Pleadin: Bonvenigo

✂ Francesco Maurelli: Reta Edukado: defioj kaj oportunoj

✂ Josip Pleadin: grafikaj teknologioj kaj eldonado

✂ Ana Manero: Bitoteko, kadre de la servoj de la Biblioteko Juan Régulo Pérez

✂ László Szilvási: Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko (STEB)

2021/08/14 – sesio 3

(<https://eventaservo.org/e/ren3>)

✂ Przemysław Wierzbowski: Kompostado de rete uzablaj materialoj

✂ Pascal Dubourg: Esperanto-arkivoj, nuna stato kaj defioj

La projekto estas kunordigata de Bjalistoka Esperanto-Societo (Pollando), kaj partoprenas Dokumenta Esperanto-Centro (Kroatio), Esperanto-KulturCentro Tuluzo (Francio), Bunta Esperanto-Asocio (Italio) kaj Kosmo Strategio ltd. (Britio).

Pliaj informoj kaj fotoj ĉe:

<https://mallonge.net/gy>

La plej granda elekto de
Esperanto-libroj kaj esperantaĵoj
en la mondo

La libroservo
de UEA

<https://katalogo.uea.org>





Esperantistaj amikoj renkontiĝis en Altaja Regiono

■ Dima Ŝevĉenko
kaj Anna Striganova

Inter la 3-a kaj 11-a de aŭgusto 2021 en la Altaja Regiono de Rusio, en la urbo Jarovoje, okazis la



15-a Renkontiĝo de Amikoj (RA-15). La redaktoroj de la revuo *Esperanto* kaj *La Kolombo de Paco* eluz-



is la okazon viziti ĝin, ja la ĉeestaj renkontiĝoj dume restas ne tiom oftaj pro la tutmonda sankrizo. Jaro-



voje troviĝas en Siberio, apud la limo de Rusio kaj Kazahio kaj estas nuntempe konata ripozloko pro la sala lago Bolŝoje (granda) Jarovoje, kiu laŭ la onidiroj



havas kuracajn efikojn. Ĝi situas pli ol 3000 kilometrojn for de la centra parto de Rusio, do eblas imagi, ke la surtera vojo, kiun ni faris, estis sufiĉe longa :). Krom la bela kaj varma lago, belaj kondiĉoj de la kurorta infrastrukturo estis ankaŭ tre agrabla Esperanta etoso, specifa por la plejparto de la rusiaj Esperanto-aranĝoj. Partoprenis ĉ. 40 geesperantistoj el diversaj



partoj de Rusio, kaj ankaŭ el Kazahio kaj Usono. En la varma amika etoso okazis pluraj programeroj, i.a. interpretista konkurso, kvizoj, tabloludoj, "Neptun-festo", komunaj koncertoj.

